Johann Wolfgang von Goethe,

Rozeto en herbejo

tradukita de Gotthilf Sellin

Knab' rozeton vidis li,
Vidis en herbejo;
Estis juna, bela ĝi,
Por ĝin vidi kuris li,
Vidis kun ĝojego.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

Diris knab': mi rompos vin,
Rozon en herbejo,
Diris roz': mi pikos vin,
Ĉiam vi memoros min,
Mi ne ĝin permesos.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

Knab' sovaĝa rompis ĝin,
Rozon en herbejo;
Kvankam roz' defendis sin,
En koler' ĝi pikis lin,
Tamen morti devis.
Roz', rozeto, ruĝa roz',
Rozo en herbejo.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Gotthilf Sellin *(*1844-05-18 – †1921-10-09).*

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en `http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo`. *Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin`.

Johann Wolfgang von Goethe,

Knab' rozeton vidis li

tradukita de Joachim Gießner

Knab' rozeton vidis li;
erikeja floro.
Juna, bela estis ĝi.
Por admiri kuris li
ĝoje kun adoro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin,
vi rozeta floro".
Diris roz': „Mi pikos vin,
ke vi ne forgesos min,
premas min doloro.".
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Knab' sovaĝa rompis ĝin;
erikeja floro.
Rozo ja defendis sin
kaj sufere pikis lin,
ne utilis ploro.
Rozo, rozo, ruĝa roz',
erikeja floro.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joachim Giessner *(*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en `http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`.

Johann Wolfgang von Goethe,

La rozeto

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Knabo vidis – jen rozeto
Sur la kampo staras;
Bela, juna la floreto . . .
Vive kuras la knabeto,
Ĝojas, miras, flaras.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

Knabo diris : « mi eltiros
Belulinon mian »;
Floro diris : « vi foriros, –
Per pikiloj mi disŝiros
Tuj la manon vian ».
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

La sovaĝa knab' ridante
La rozeton prenis, –
La floreto batalante
Sin defendis pikadante,
Sed la sorto venis.
Sur la kampo la rozet'
Kiel infanet'.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de Johann Wolfgang von Goethe *(*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Ludwig Lazarus Zamenhof *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.